

M. 15093: /

(bif. 1 brev ö. översättn / sid.)

Belgien

uppt. år 1952

Svar på LllF 85 rör. hästhöft och hästslakt m..

s. 1.

Belgien

M.15093.

FOLKLIVSARKIVE
Institutionen för folklivsfors-
ning vid Lunds universitet

61



FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

Societo por la akcelo de Esperanto
kiel universala helplingvo en la internaciaj rilatoj

~~Blankenberge~~

Blanken

La Etnologia Arkivo,
Universitato de Lund,
Finngatan, 8.

LUND. Sved.

Blankenberge, la 1-an de julio, 1952.

Estimataj Sinjoroj,

Mi havas la plezuron havigi al vi ĉi-kune la res-
pondon de s-ro J.JACOBS, Vicprezidanto de la Mondfederacio por Best-
protektado, el Antwerpen,
al viaj demandoj pri la "buĉado de ĉevaloj".

La informoj kiujn mi persone kolektis pri la samaj demandoj
rilate mian loĝlokon: Blankenberge, akordiĝas kun tiuj de s-ro Jacobs,
tiel ke superfluas fari specialan raporton.

Atestime salutas,

Fr. Couwenberg

Fr. Couwenberg,

UEA-Peranto por Flandra Ligo Esperantista,
14. Koninginnelaan,
Blankenberge.Belgujo.

61

Belgion

M. 15093:1.

FOLKLIVSARKIVET

Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

Koninklijke Antwerpse Maatschappij tegen de Wreedheid jegens de Dieren



(V. Z. W.)

SECRETARIAAT : Boomsesteenweg, 444,
Antwerpen. Tel. 37.71.20

ZETEL : Bureel van de Dierentuin,
Koningin Astridplein, 26, Antwerpen

Tel. 32.52.59 - 32.22.80 P. C. 4466,53

Gemeentelijke Bewaarplaats voor Dieren: De Bosschaertstraat, 141, Antwerpen. - Tel. 37,57,12

VIGILANTIA
ET
PRUDENTIA

Antwerpen, 14 aprilo 1952.
Boomsesteenweg, 444.

Esploro pri buĉado de ĉevaloj.

1, Kia estis antaŭe la opinio pri ĉevalviando kiel nutraĵo kaj kia ĝi nun estas? Jam antaŭ pli ol 60 jaroj la ĉevalviando estis estimata kiel tre sana kaj tre nutra manĝaĵo. Sed pro tio ke la koloro estis pli malhelruĝa kaj ke ĝi estis pli sengusta ol la bovoviando, nur malriĉuloj manĝis ĝin. Ankaŭ kuracistoj rekomendis ĝin por plifortigi reanigantoj. La ĉevalviando estis malpli bonkvalita, ĉar ĝi plejofte devenis de maljunaj, malsanaj ĉevaloj, kiuj venis el la karbominejoj, praĉipe el Anglujo.

Nun multe pli da personoj manĝas ĉevalviandon, ĉar ĝi estas la malplej multekosta. La kvalito estas pli bona. Pro tio ke la maŝinoj anstataŭas la ĉevalojn, oni komencis bredi buĉĉevalojn, kies viando estas pli bongusta. En Antwerpen & Belgujo, oni de antaŭ kelka tempo vendas ĉevalviandon en la grandaj magazenoj.

Dum la jaro 1951 alvenis en Antwerpen el Irlando 9127 ĉevaloj kaj 152 azenoj por esti buĉataj.

2, La buĉado de ĉevalo jam delonge estas kutimo; do oni ne plu konsideras ĝin kiel socialan malhonoron. La buĉado de hundo aŭ kato oni malestimas.

3, Ne ekzistas specialaj personoj kiuj havas la taskon mortigi ĉevalojn.

4, Oni buĉas la ĉevalojn en la publikaj buĉejoj laŭ la sama maniero kiel la bovoj kaj bovinoj. Antaŭ ol tratranĉi la gorgon oni sensentigas ilin per pafo de revena metalpinto en la cerbon de la animalo.

J. Jacobs.

Vakdelegito por animalprotektado,
Vicprezidanto de la Mondfederacio por
Animalprotektado,
Sekretario de la Rega Societo por Animalprotektado-Antwerpen.

Belgien

M. 15093.

FOLKLIVSARKIVET

Institutionen för folklivsforskning
vid Lunds universitet

61

Undersökning av hästslaktning.

1. Hur var förut meningen om hästkött som födoämne och hur är den nu? Redan för mer än 60 år sedan uppskattades hästköttet som mycket hälsosamt och närande födoämne. Men på grund av att färgen var mera ljus röd och för att det var mera smaklöst än oxkött, åt endast de fattiga det. Även läkare rekommenderade det för att stärka konvalescenter. Hästköttet var av mindre god kvalité, ty det kom oftast av gamla, sjuka hästar, som kommo från kolgruvorna, särskilt från England.
Nu äter många flera personer hästkött, ty det är det billigaste. Kvalitén är bättre. Därför att maskinerna ersätter hästarna, har man börjat uppföda slakthästar, vilkas kött är mera välsmakande. I Antwerpen, Belgien, säljer man sedan någon tid hästkött i stora affärer.
Under år 1951 kom till Antwerpen från Irland 9127 hästar och 152 åsnor för att slaktas.
2. Slaktandet av hästar är sedan länge en sed; man anser det alltså inte som social vanheder. Slaktandet av hund eller katt avskyr man.
3. Det finns inte särskilda personer, som har till uppgift att döda hästar.
4. Man slaktar hästarna i offentliga slakthus, efter samma princip som oxar och kor. Innan man skär av strupen, bedövar man dem med en rekylrande metallspets i djurets hjärna.

J. Jakobs.